



PENSEO

N-ro 328

feb. / 2019

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 30-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Maria Nazaré Laroça (Brazilo)

Hongjia (Ĉinujo)



Turisto

Novjarfestoj en Novjorko:
pluv' da lumoj, kiu nin ravas...
Sur la stratoj de Manhattan,
mi marŝas, kiel rolulo
de filmo de Woody Allen.

L' impona urbo filmecca
elegante sin vestas;
dume en la Centra Parko,
ĉiuj arboj senvestiĝas
por bonvenigi la vintron.

Tamen averto nin sekvas,
ĉie, per ruĝa afiŝo:
jen ĉioestanta EXIT ...
Necesas hejmenreveni.



Nova York, 01/01/2019.

Avertita tragedio

Kiom da fia
monavido!
Ĝis kiam
ĉi tiu koto
en l' animo?

Juiz de Fora, 27/01/2019.

Soleca arbo

Mi staras sur la monto nun izola,
folioj estas miaj okuletoj.
Rigardas ĉien mi sub la sunlumo
kaj serĉas vin okule senkonsola.

Ne pensu, ke mi firmas sur la tero.
Spionas mia koro vin en foro.
Mi timas nek mizerojn nek suferojn,
mi vin sopiras ĉiam kun sincero.

Kvankam mi staras de l' aliaj sola,
mi fakte estas torĉ' levita alte.
Ĉu vi en foro vidas efektive
fajrerojn ŝpruci el brulad' petola?



Sopiro

Jam longe mi ne aŭdas pri vi, kara,
Kalkulas mi l' distancon de sopiro:
Mi paŝas sur la pado nenifara,
hezite iras antaŭ l' arb-spaliro.
Kun kap' klinita mi meditas nune,
silente nombras tempon en la menso.
Sopiro mia jen naskiĝas kune
kun via belfigur' en mia penso.
Mallongas la sopir' en palpebrumo,
ĝi tamen longas tra la tuta jaro.

Mi foje drivas en nebula brumo,
 kaj foje dronas en memora maro.
 Forgesi vian nomon mi ne povas,
 sur lipojn mi ĝin metas ĉiutage.
 Mi kompreneble ĉiam pene trovas
 informojn viajn real-vive vage.
 Mi vere tenas vin en la animo,
 sed ofte mi desperas de l' sopiro.
 Vi estas ja en fremda malproksimo,
 min kredu: mortos ne la aspiro.

Velkinta petalo

Blovas vent' ĉe aŭtunfino,
 pluvo batas kun obstino.
 Velkas florpetalo,
 flirte en ŝvebfalo,
 jen malsupren laŭ destino.

Ĝia korpo jam sen sango,
 falas, falas en vent-tango,
 ĝis malvarma tero,
 tute sen espero,
 mortos ja kun blanka vango.

Vipas pluv' kun energio,
 ĝi jam kuŝas sen konscio
 sur la tero frida
 el la grund' humida,
 jen sen ajna ĝema krio.

Vent' ne povas blove movi
 ĝin, nek ĝian movon trovi.
 La petal' malseka
 jam fariĝis feka
 aĵ', sen ŝanco freŝe novi.



Yanke (Ĉinujo)

Baraktado en neĝo

Vadante en la neĝo ĝisgenua,
 mi lacas ja pro paŝad' sintrena.
 Mi volas iri jen per paŝo plua,
 sed mi ne povas kvazaŭ enkatena.

Baraktas mi svingante manon pene,
 kaj movas la piedon malsukcese.
 Ĉu rampi? mia mano sinkas svene
 kaj falas eĉ la tuta korp' senĉese.

Mi sentas min pli kaj pli malespera,
 mi volas voki helpon, sed ne homo
 troviĝas ie sub la sun' vespera,
 kaj fore staras nur kaduka domo.

Tuj mi vekiĝas el la song' subite
 baraktas torde mi en lito ŝvite.

Papos Nascentes (Brazilo)



Persono al si mem

ĉ

iam se masko
 la pago pli kara
 pli da vangofrapo

kiom pli kara
 ĉu mi pli ombra
 pli ombrofara?

masko surfaca
 el Si mem forfuĝe
 kiu verŝajnas?

kiu el Si mem forfuĝas
 ĉu ŝajnigo ĉu sfinkso?
 pli ol anim'
 Memo Mi mem!

Spiro

Estis Blovo, neelpensebla Spiro, samtempe lumo kaj konscienco. Kaj estis majstro, saĝo ĵus elirinta el la letargio de la dormo, el la sfero de la senfinaj eblecoj. Kaj estis sugesta kaj insista konvinko, ke nenio solida aŭ konkreta ekzistis. Ĉio nur ŝajno. Realo estis la trem-brila reflogo de oraj eroj. Kio plu ĝi estus? Ĉu formo? Male, nur sentebla en-formo, ene de la formo, ene de la ago. Softvaro kun sia kodo revelaciita.

Tio okazis post la nerifuzebila dormemo kaj ekvido pri io venonta. Or-lume, purpure vestita, la gracia Vero duonvidigis sin, alloga kaj amema. Tiu nesuspektable beleco lasas ŝin, travidebla kaj nuda, ripozi en sciencaj laboratorioj, en filozofiaĵoj, dum la eterna ĝermado de iuj tradicioj. Sed ĝi percipe loĝas

la forvaporigon de Poezio, kiu milde trablovas artojn.

Malklera mi estas pri ĉio tio, pro la enfermiteco en la formo, tempo, spaco. Min vestas peza plumba kapujo kaj kombineo. Plumbofaritaj estas miaj botoj. Sed, sekreta, en kaŝ-angulo de la koro, vaporigita oro ŝvebas sur maro de trem-brilo, tiu diafana esprimaĵo de l' Sen-tempo. La plumba subakviĝa vesto, kiu min subkaŝas kaj movojn baras estas ankaŭ, ĝi mem, ne plu ol iu nombro de vibroj – ŝajno surmetita sur Realo. Ĉu “mia” vivo estus “mia” konscienco? Ĉu mi estas en ia “mio”? Ĉu spegule de la “aliulo”? Kiu scias, substanco, unu el “miaj” instancoj kerne de la plurdimensienco, kiu mi estas? Malklera pri ĉio tio mi estas. Kiel mi scias, ke mi estas tio?

Kaj, tamen, tion mi scias: la reala naturo de mia mallerteco – ne plu ol ŝajno! Tion al mi blovis la saĝulo. Mi, nur la amfitriono lin proponanta etan kafon. Same, gastigadon.

Mori (Usono)



Aforisme (39)

Homo kies poŝo
plenas je mono
ĉie en la mondo estas
respektata persono.

En ĉiu lando
prospero kaj mizero
plejparte estas politika afero.

Amiko kaprica
evitendas samkiel
malamiko malica.

Homo tiam estas
vere feliĉa

kiam neniu estas malriĉa!

Mi trinkas kafon
kun malamiko malica
sed forkuras de
amiko kaprica.

Homoj diferencas
unu de la alia,
nature
sed devas ja esti egalaj,
Jure.

Lupo sovaĝa
kaj vulpo ruza
malpli danĝeras
ol homo ĵaluza.

Kie ajn socia justu,
kaj komuna bonfarto
estas la ĉefa politika afero

tie estas paradizo sur la tero.

Kiam idiotoj kunlaboras
kun la despotoj
la koston pagas
kaj idiotoj kaj patriotoj.

Kie libereco
justo kaj egaleco,
estas nur sur la papero
tie oni vivas en la infero.

Oni por vivi
feliĉe
devas esti gaja
senkondiĉe.

Tie, kie regas despoto
Homoj baraktas
kiel fiŝo en koto.

Vivo de la homo
sen libero
estas kiel tiu de fiŝo
en la seka rivero.

Tie, kie oni suferas
je malsato
frato batalas
kontraŭ frato.

La plej grandaj krimoj
sur la tero
okazas nome de Dio
kaj libero.

La unua tasko
de ŝtato
estas batali kontraŭ
Mizero kaj malsato.

Se ne estus
pro korupto de ŝtato
neniu suferus
de mizero kaj malsato.

Ĉio en la mondo

Progresis
krom Homo mem
kiu regresis.

Suferi en la kaĝo
kiel fiera leono
pli bonas ol ĝui liberon
kiel hieno.

Ĉiuj animaloj zorgas
Pri siaj karaj infanoj,
Homo estas tiu, kiu zorgas
pri ĉiuj homaranoj.

Morto kun honoro
estas pli valora
ol vivo sen honoro.

Vivu la vivon
laŭ via bontrovo kaj volo
sen zorgo pri alies preparolo.

Tiuj, kiuj sen labori
Havas ĉion
vivas sur la dorso de
tiuj, kiuj multe laboras

kaj tamen havas nenion.

La vivon riĉigas
ne plenaj poŝoj
sed firmaj paŝoj.

Ne la haŭta koloro
sed tio, kio estas en la koro
estas la vera valoro.

La kerno de ĉiu vera kredo
estas bonfarto de l' homaro,
tutmonda paco
kaj senkondiĉa amo
la cetero estas misgvida
reklamo.

Homo sen saĝo
kaj kuraĝo
estas kiel birdo
en kaĝo.

Merito de herooj
pruviĝas en bataloj,
ne en la dancohaloj.

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Plektas arane'
reton de sia vivo.
Eluzita faden'.



L'abela maso
serĉas por si loĝejon.
El migrinteco.



Plektis arane'
blankan rozon en reto.
Amsenta ludo.



Ruĝigil'. Pudro.
Glicine' en hararoj.
Gejŝ' en te-trinkej'.

Henriko Heine (1797-1856)



Sklavoŝipo

1

La kargkomercist' Mynheer van Koek
sidante kunnombas kajute,
kalkulas kaj pri la kargvalor'
kaj pri l' profito entute.

„Bonegas la pipro, bonegas la gum',

amason da ili mi havas.
Enŝipas oro, eburo eĉ —
la nigra varo pli gravas.

Sescent negrojn, ridindis la prez',
mi prenis al mi Senegale.
Pro l' firma karn', kaj ĉiu tenden'
elastis kvazaŭ ŝtale.

Mi donis en la interŝanĝ'
ŝtalaĵojn, bidojn kaj brandon.
Okcentprocentos tial la gajn',
se vidos nur tricent la strandon.

Restos de l' negroj duono nur
havene de Rio-Janeiro,
pagos po cent dukatojn al mi
l' firmao Gonzales Perreiro.“

Pro interromp' Mynheer van Koek
nun haltas pri sia fervoro,
la ŝipkuracist' envenas al li,
van Smissen, la doktoro.

Li estas skelete svelta figur' —
verukoj surnazas araj.
„Nu, marokirurg, ekkrias van Koek,
ĉu sanas la negroj karaj?“

„Jen mian dankon“, diris la doktor',
„mi venis, ĉar mi informas,
ke lastanokte la mortec'
progresis kaj enormas.

Po tag' ĝis nun nur mortis du,
hodiaŭ sep formortis.
Kvar viroj, tri inoj – mi tuj sen hezit'
la perdon ŝiplibre raportis.

Mi zorge kontrolis je ĉiu mortint',
ĉar tiu ruza aro
per ŝajna mort' forŝtelas sin
ĵetite al la maro.

De ĉiu mi prenis la ĉenojn for
kaj kiel kutime plue,
mi lasis ĵeti ilin de l' ŝip'
jam enmatene frue.

Elsagis jen baldaŭ el la ondar'
la ŝarkoj, grandaj kvantoj.
Ŝatantoj estas pri negrokarn',
de mi estas pensiantoj.

La ŝarkoj sekvis nin sur la voj'
de l' ŝipo ekde la bordo.
La fiaj bestoj elflaras ja tuj
kadavrojn por grasa mordo.

Komikas tiom la observ',
se ŝarkoj kadavrojn mordas!
Jen kapt' je kap' jen kapt' al krur'.
La rest' intestojn distordas.

Vorinte ĉion, petolas la ar'
kontente la ŝipoflankojn,
gapante al mi, kaj ŝajnas eĉ,
volonte dirus eĉ dankojn.“

Ĝemante interrompas lin
van Koek : „Kiel mi povos
malhelpi, ke kreskos plu tiu plag'?
Ĉu sin rimedo trovos?“

Van Smissen rediras : „Pro propra kulp'
tre multaj negroj jam mortas.
Elspiroj de l' negroj en la hold'
haladzojn ŝipfunden portas.

Kaj kelkaj mortis pro melankoli';
mortigas la troa enuo.
Sanigos ilin do aer',
muzik' kaj dancoĝuo.“

Jen vokas Koek : „Brila konsil'!
Vi saĝas eĉ pli, doktoro,
ol iam la Aristotel':
de l' granda grek' la mentoro.

La prezidant' de la societ'
en Delft por la greft' de l' tulipo
prudentas tre, sed estas li
rilate al vi nur ŝtupo.

Muzik'! Muzik'! La negroj do
ekdancu ferdeke de l' ŝipo.
Se iu jam satas pri la amuz',
li hope saltu per vipo.“



2

De l' alt' el blua firmament'
rigardas stelomiloj
sopire lumas kaj kun saĝ',
kun inaj okulaj briloj.

La steloj rigardas al la mar'.
Jen kuŝas vastaj rondo
en fosforeska purpurfarb';
Volupte kveras la ondoj.

Ne flirtas veloj sur l' sklavoŝip'
Laŭ ŝajn' sen rig', surmara.
Lanternoj briletas sur la ferdek'
ĉe dancmuzik' barbara.

Stiristo violonas nun,
kaj flutas kuiristo,
ŝipbubo batas sur la tambur',
trumpetas la kuracisto.

La inoj, viroj, ŝajnas eĉ cent,
jubile saltante baraktas
freneze eĉ, ĉe ĉiu salt'
la feroj tinte laŭtaktas.

Sovaĝe surstamfas la plankojn la ar'

kaj kelkaj negrulinoj
sin kroĉas volupte al nuda amik'—
eksonas ĝemaj kulminoj.

Gardist', la Maitre des plaisirs,
per vip' stimule pelis
dancistojn pigrajn al gajec',
ke ili ĝoju, celis.

Kaj violonad'! Kriad' kaj ĉin bum!
La bru' el la profundo
logas monstrojn de l' akva mond'
el stulta dorm' sur grundo.

Centoble ŝarkoj alnaĝas pro ĝi,
dormeme ili venas;
kaj gapas al la ŝipferdek',
perpleksas, ne komprenas.

Ne venis jam la matenmanĝ',
oscedaj ŝarkoj, ĝin sentas,
malfermas la faŭkojn, makzeloj jen
dum montraj segodentas.

Kaj violonad'! Kriad' kaj ĉin bum!
ne haltas la dancoj pluire.
La ŝarkoj primordas sen pacienc'
la proprajn vostojn ŝire.

Mi pensas, ne plaĉas ŝarkojn muzik'
laŭ multaj el tia ĉi bando.“
Ne fidu bruton sen am' pri
muzik'! Jen Shakespeare el Britlando.

Kaj violonad'! Kriad' kaj ĉiu bum!
Ne haltas la dancoj pluire.
Ĉe l' antaŭmast' Mynheer van Koek
manpreme preĝas suspire:

„Je Kristo, lasu plu vivi por mi
la nigrajn pekintojn, Dio!
Se l' stultaj bovoj incitis vin,
vi scias ja bone pro kio.

La vivon do lasu, pro nia Krist’
mortinta por la homaro!
Se restos malpli ol tricent nur,
mi ne profitos de l’ varo.“

el „Das Sklavenschiff“, H.Heine: *Alle Werke*,
Band 1, Seite 258

La sklavigo de la negroj, malpermesita en la britaj kolonioj en 1833, en la francaj en 1848, estis malpermesita de Usono nur en la jaro 1865, de Brazilo en la jaro 1871, kvankam ilia transportado el Afriko estis jam formale malpermesita en la jaro 1826.
„Mynheer van Koek“ (prononcu: majnhe:r! vankuk), ŝerca nomo, kiu signifas 'Sinjoro Kuko'. Maitre des plaisirs (pr. metre deplezir!): aranĝanto kortegaj baloj kaj baletoj.

Rio Janeiro: Rio de Janeiro, iama ĉefurbo de Brazilo.

Tradukis



Hans-Georg Kaiser
(Germanio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKSEPA

Aŭtuna riverŝvelo

§17-02

La unukrura monstro envas la miriapodon, ke tiu havas tiom da piedoj; la miriapodo envas la serpenton, ke tiu moviĝas sen piedoj; la serpento envas la venton, ke tiu flugas sen formo; la vento envas la okulon, ke tiu povas vidi; la okulo envas la menson, ke tiu povas pensi.

La unukrura monstro diris al la miriapodo:

“Mi hopas per unu piedo; tio estas simpla kaj oportuna. Mi scivolos, kiel vi povas marŝi per tiom multe da piedoj.”

“Ne trafa estas via diro!” respondis la

miriapodo. “Ĉu vi ne iam vidis iun, kiu kraĉas? Kiam la salivo estas elĵetita, la grandaj gutoj estas kiel perloj kaj la malgrandaj estas kiel eretoj de nebulo. Ili mikskonfuzo falis en nekalkulebla nombro. Nun ke mi moviĝas laŭ mia denaska naturo, mi vere ne scias, kiel kaj kial mi agas tiamaniere.”

Post iom da tempo la miriapodo diris al la serpento:

“Mi havas tiom multe da piedoj, dum vi havas nenium. Kial mi ne povas moviĝi tiel libere kiel vi?”

“Kiel mi povus ŝanĝi la funkciojn de mia denaska naturo?” respondis la serpento. “Kial mi devus havi piedojn?”

Poste la serpento demandis la venton:

“Kiam mi tordiĝadas antaŭen movante miajn spinon kaj flankojn, miaj movoj estas videblaj. Kaj tamen, kiam vi impete leviĝas de la Norda Maro kaj brue blovas dum la tuta vojo al la Suda Maro, viaj movoj estas nevideblaj. Kiel do tio fariĝas?”

“Estas vere,” respondis la vento, “ke mi impete leviĝas de la Norda Maro kaj brue blovas dum la tuta vojo al la Suda Maro, sed kiam oni montras fingrojn al mi, oni povas venkas min, kaj kiam oni premas min per la piedoj, mi povas fari nenion kontraŭ tio. Kaj tamen mi estas la sola, kiu povas rompi kolosajn arbegojn kaj detruigi gigantajn domegojn. Jen kiel mi atingas grandan venkon suferante multenombrajn etajn malvenkojn. Neniu krom la saĝulo povas atingi tiajn grandajn venkojn.”

§17-03

Kiam Konfuceo estis plurvice sieĝata de la trupoj de la regno Song dum sia vojaĝo en la urbo Kuang, li senĉese kantis kun akompano de sia liuto. Zilu, lia disĉiplo, venis lin vidi dirante:

“Majstro, kial vi estas tiel gaja en la nunaj cirkonstancoj?”

“Alproksimiĝu kaj mi diros al vi la kialon. Jam de longe mi penas min elturni el mi

malfeliĉo, sed vane. Tio estas destinita de mia sorto. Jam de longe mi penas atingi sukceson, sed vane. Tio estas ŝuldata al la malfavoreco de la tempo. Dum la regado de la reĝo Yao kaj la reĝo Shun ekzistis neniu el la popolanoj, kiu vivus en malfeliĉo, sed tio ne estis ŝuldata al ilia klereco; dum la regado de la reĝo Jie kaj la reĝo Zhou ekzistis neniu el la popolanoj, kiu vivus en feliĉo, sed tio ne estis ŝuldata al ilia malklereco. Tio estis ŝuldata al la tempo kaj la cirkonstancoj! Ne timi inundajn drakojn en la akvo, jen la kuraĝo de la fiŝistoj; ne timi rinocerojn, nek tigrojn sur la tero, jen la kuraĝo de la ĉasistoj; alfronti glavon klingon spite al la morto, jen la kuraĝo de la militistoj; scii, ke la feliĉo kaj la malfeliĉo estas deciditaj de la tempoj aŭ de la sorto, kaj brave maltimi la danĝerojn, jen la kuraĝo de la saĝuloj. Nu, vi do ne zorgu pri mi! Mia sorto jam estas antaŭdestinita de la Ĉielo.”

Post iom da tempo iu oficiro de la trupoj envenis kaj petis pardonon, dirante:

“Ni ĉirkaŭis vin pro tio, ke ni prenis vin por iu Yang Hu. Nun ni konfesas nian eraron kaj petas vian pardonon.” Kaj ili retiriĝis.

Elĉinigiŝ



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

El Ĉina Antikva Poezio

Meng Haoran (689 – 740)

Printempa mateno

La dormo printempa vekigon ne konas,
Matene, sed ĉie, birdpepo resonas.
Hieraŭ en nokto de pluvo kaj vento,

Ve, kiom da floroj falis en lamento?

Li Bai (701 - 762)

Sola sidante sur la monto Jingting

Ĉiuj birdoj malaperis alten,
Sola nubo ŝvebas for laŭvole.
Nur la monto Jingting kaj mi vidas
Unu la alian nun konsole.

Wang Zhihuan (688 – 742)

Sur la turo Cuanqiao

La helpala suno falas post montaron,
Fluas la Rivero Flava en la maron.
Por rigardi pli sublیمان belpejzaĝon
Nepras iri sur pli altan turetaĝon.

Jin Changxu (? - ?)

Printempa rankoro

Mi la oriolejn fortimigas,
Ke sur branĉoj ili ĉesu trili,
Ĉar la ĉirpo rompis mian songon:
Mi ne povus al Liaoxi* aliri.

**Liaoxi: indikas la regionon okcidente de la rivero Liao en la nuna provinco Liaoning. Siatempe la loko servis kiel limgardejo, kie garnizonis “mia” edzo.*

Wang Wei (701 – 761)

La domo en bambuoj

Sidante sola en l' malhela bambubosko,
Liuton plukas mi kaj kanta senkompane,
Fore de l' homa mondo, en la dom-kiosko;
Al mi la luma luno brilas akompane.

Cui Hao (704 – 754)

Popolkanto el Changgan

He, sinjoro, kie estas vi?

Tie ĉi en Hengtang loĝas mi.
Ŝiphaltige, mi demandas, nu:
Ĉu samprovincanoj estus ni?

Elĉinigis



Minosun (Ĉinujo)

Kou Zhun (961-1023)

En nordo herboj densas

—laŭ melodio *Ĉe pasejo Yangguan*
En nordo herboj pompe densas
sur vast' en frost-rigor',
la Wej-rivero onde plaŭdas
verŝajne en singulta plor'.
Matena pluvo ĉesis,
humidas polvo en stupor'.
Jam oni sidas sur ĉevala selo
nun preta por vojaĝ' al for'.
Adiaŭantoj ŝiras salikbranĉojn
por montri adiaŭan domaĝemon.
La sceno kirlas sentojn en la kor'.
Oni ne scias pri venonta
la rekuniĝ', en kia hor'?

Do, trinku plian tason
da vino kaj mi kantu por
esprimi al vi ĝisrevidon.
Kuniĝ', ve, malfacilas,
disiĝo oftas de dolor'.
Bonvolon mian ne rifuzu
per evitema la parol'
kaj finaŭskultu nian kanton
antaŭ vojaĝo via.
Amikoj de honor',
ho, kaj parencoj karaj,
ekde nun ni sopiru
defore sub la sama lunoglor'.

Lin Bu (967-1028)

Montoj verdas

—laŭ melodio *Longa sopiro*

Montoj verdas sur la norda bordo,
montoj verdas sur la suda bordo.
Montoj vidas
renkontiĝojn kaj adiaŭadojn
de gehomoj en konkordo,
sed ĉu montoj konas
tiujn sentojn de kor-mordo?

La amato larmas kun senvorto,
ankaŭ mi larmperlas kun senvorto.
Ni ankoraŭ
ne nin ame ligis laŭ la sorto,
sed vi jam ekiros
sur la boata babordo.

Fan Zhongyan (989-1052)

La pejzaĝo norda

—laŭ melodio *Fiŝista fiero*
La pejzaĝo norda
prenas ŝanĝojn tristajn en aŭtun'.
Al direkt' de Hengyang
sovaĝanseroj en grupa kun'
flugas for sen domaĝemo.
Garnizonaj klarionoj ĉe vespero
sonas ĥore jam en nun'.
En nebulo densa
subiranta sun'
pendas kline super,
kun ŝlosita pord', la urb'
sola inter mil montklifoj.

Mane kun tas' da kruda rum',
mi sopiras pri hejmloko mia
fora dekmil liojn
en la svaga brum'.
Sen merit' kaj famo,
kiujn havas intaj bravemuloj,
mi silentas en mallum',
kaj ne rajtas frue hejmeniri.
Sonas ŝalmo-fluto melodie
kun la tera fon' de blanka prujn'.
Jam vigilas la grizhara generalo

kaj soldatoj ja suferis kun larmfalo.



elĉinigis



Vejdo (Ĉinujo)

Cao Cao (155-220)

Spektado al la maro

Al Jieshi-monto
mi alvenas spektadi
maron kun ondo.

El akva fluo
insul-montoj elstaras
sen ajna skuo.

Arboj en aro
prosperas, kaj tre densas
ĉie herbaro.

L' aŭtuna vento
ululas kaj ondegtoj
bolas kun splendo.

Suno kaj luno
leviĝas ja alterne
kvaz' el marbrumo.

Brila stelaro
ankaŭ kvazaŭ naskiĝus
ja el la maro.

Kun ĝojopleno
mi kantas l' ambicion
per ĉi poemo!

elĉinigis



Gajo (Ĉinujo)

Ĉineske

Eto (Ĉinujo)

Dum soleca tempo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Mi volas
en la kabano
min fermi volonte,
tie 'stas ne kompano
nur simpla pano.

Mi havas
kelkajn librojn nur,
kaj mi ja ade legas
ilin kun buŝa murmur'
kaj granda plezur'.

Legante,
pensas libere
mi per bela imago
kaj skribas surpapere
versojn abele.

Soleco
min vere mordas,
sed mia vol' obstinas.
Mia kor' ja ne mortas
kaj l' cerbo fortas.

Gustumas
la suferon mi
de soleco ĉiama
en ĉi kanabo kun pi'
sen ajna anksi'.

Mi scias,
nur pacienco

servas kiel instigo
al kreiva intenco—
bona komenco.

Tre laca
mi eĉ sentas min
fojrefoje senĉese,
mi persistas kun obstin',
spite al destin'.

Okaze
kun trankvila kor'
rigardas tra fenestro
mi nubon kun blankolor'
aŭ arbon en sol'.

Longlonge
kutimas mi jam
al tia enkabana
soleco sen kora flam'
plie eĉ sen am'.

Volontas
mi sidi vere
en soleca kabano
kaj vivas korleĝere,
vivas prefere.

Miric Jadranka (Serbio)



Estonteco nia mallaŭda

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Matena
suno kaŝita
inter nubetoj. Veras.
Kvazaŭ vitro ŝprucita.
Nepurigita.

Kia tag'
tia humoro.
Ve, ne aŭskultas vi min.

Kia rigardo, koro
mia. Fi, oro!

Alogas
vin, plena, ja
monujo, luksa domo.
Ĉio faciluzebla,
je spiro kurta.

Neĝeroj
falas malofte,
por pli blankigi mondon
kaj ĝin purigi softe.
Nepre volonte!

Homaro
sin purigos de
malbono per amo aŭ
ni malaperos tute
laŭnature. Ve.

Kiam nebulo leviĝas

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Blankiĝis
altaĵo. Flokoj
falas malrapide. Jen,
ŝvebas aere miloj .
Ĉiuj steletoj

sespintaj!
De neĝa kristal'
lameno sesangula.
Dance tra aerbatal'
pretiĝis por bal'.

Matena
tre densa nebul'
kovris blankajn branĉaron.
Videblas nenia ul'
nur tiu neĝul'.

